



La knaboj de Paŭlo-strato

La kvin knaboj de Paŭlo-strato ludis per kugletoj en la muzeoĝardeno. Jam 12 globetoj estis ĉe la muro, kiam ili rimarkis ke la du Pásztor-knaboj¹ alproksimiĝis. La kvinopo ektimis antaŭvidante la atakon de la pli fortaj.

«Vane ni estis kvin, ili du estis tiel fortaj, ke eĉ dek ili povus tradraŝi. Kaj oni ne povas nin tiel kalkuli, ke ni estas kvin, ĉar se estas danĝero, tiam Kolnay forkuras, kaj ankaŭ Barabás forkuras, do el ni oni povas kalkuli nur [je] tri. Eble ankaŭ mi forkuras, do oni povas kalkuli nur du. Kaj eĉ, se eble ni ĉiuj forkuras, tio valoras nenion, ĉar la Pásztor-knaboj estas la plej bonaj kurantoj en la tuta muzio kaj ni vane kurus, ĉar ili atingus nin. Do venis la Pásztoroj, ĉiam pli proksimen ili venis kaj tre rigardis la kugletojn!»²

Vane la knaboj el Paŭlo-strato faris neniam ion ajn malbonan al la du grandaj, tiuj tamen venis, ĝuste kiam Nemeček trafis kaj gajnis, kaj forprenis la kugletojn (preskaŭ tridek, inter ili du vitrajn) kriante «Ejnŝtand!»³

Tiun scenon de la fama hungara romano *La knaboj de Paŭlo-strato* ekvivigis la skulptaĵgrupo en Budapeŝto, inaŭgurita en septembro 2007. La realgrandaj bronzaĵoj estas lokitaj antaŭ lernejo, en la sama kvartalo de la hungara ĉefurbo kie la intrigo de la romano ludiĝas. La artaĵo estas omaĝo al la verko aperinta antaŭ 100 jaroj kaj al ties aŭtoro Ferenc Molnár.

Ĉi tiu literaturaĵo estas unu el la plej legataj hungaraj romanoj.

Nur en Hungario ĝi estas eldonita 45 fojojn en 5 milionoj da ekzempleroj. Ĝi estas ankaŭ la plej fama hungara verko en eksterlando, kiun oni tradukis al kelkdekoj da lingvoj. Ĝi estas deviga aŭ konsilata legaĵo por lernejoj en pluraj landoj: krom en Hungario ankaŭ en Italio, Japanio, en kelkaj ŝtatoj de Usono kaj en Pollando. En tiu lasta, ekzemple, nur post la dua mondmilito ĝi havis du tradukojn kaj 36 eldonojn. En Italio la romano aperis en 4 diversaj tradukoj.

Krom la libroforma disvastiĝo pretiĝis teatraj adaptaĵoj kaj ankaŭ pluraj filmversioj, jam en 1914 kaj 1924, kaj kompreneble ankaŭ nuntempaj. La plej fama el inter ili estas tiu el 1968 sub la reĝisorado de Zoltán Fábri kaj kun pluraj usonaj infanartistoj.⁴

Kvankam *La knaboj de Paŭlo-strato* temas pri infanoj, ĝi ne vere estas porinfana literaturo, same kiel ne estas tio la romano *La moŝto de l'muŝoj*⁵ de William Golding aŭ la *Konfuzoj de edukato Törless* verkita de Robert Musil.

La hungara romano temas pri adoleskantoj, kiuj konfrontiĝas kun la plenkreska vivo, provas ĝin imiti kaj rekrei en siaj vivseriozaj ludoj, formante ties regulojn kaj reprezentante la figurojn de herooj, patriotoj kaj perfiduloj, amikoj kaj malamikoj, gvidantoj kaj etaj grizaj personoj, bonuloj kaj aĉuloj.

La romano priskribas unu semajnon de la taĉmento de malriĉaj ĉefurbaj infanoj, kiuj devis protekti sian karan «grundon»⁶ en batalo kontraŭ la bando de samkvartalaj riĉaj infanoj. La legantoj kunvivas kun la infanoj en la lernejo, en ludsituacioj, dum lernado, disputoj, bataloj, preparoj al milito, spionado, formalaj societkunsidoj, akuzoj kaj pardonpetoj.

Dum tiu semajno pluraj el la infanoj trairas la plenkreskadon, travivas ties malfacilaĵojn kaj kontraŭdirojn, alfrontas maljustecon kaj devas travivi ankaŭ la sensencan morton de sia kamarado, la sindediĉa etulo kaj granda heroo de la verko.

La romano ludiĝas komence de la 20a jarcento, antaŭ la unua mondmilito, sed pro siaj universalaj kaj ekstertempaj moralaj kaj homaj temoj ĝi ne devus perdi sian aktualecon eĉ en la tempo de Harry Potter.

Se la bronza romanfiguroj sur la strato de Budapeŝto atentige memorigas la lernejanon pri nenio alia ol pri la (poste kondamnita kaj pentita) ĉikanado de la du Pásztor-knaboj, kaj se sekve pro la artaĵo pluraj sendefendaj infanoj eskapas humiligon aŭ batadon, foje eĉ murdon, la mondo jam fariĝas signife pli bona kaj homa.

Teksto: Katalin Kováts – Foto: Péter Kollányi

¹ [Prononco de la nomoj](#) : Pásztor [paastor], Kolnay [kolnai], Barabás [barabaaŝ], Nemeček [nemeĉek], Ferenc Molnár [ferenc molnaar], Harry Potter [herri poter]

² Fragmento el *La knaboj de Paŭlo-strato*, al Esperanto tradukita de Ladislao Somlai (Spierer), unue eldonita en 1937 en Anglio, fare de Esperanto Publishing Company LTD., Heronsgate, Rickmansworth. La interkrampa vorto [je] estas aldonita de la aŭtoro de la artikolo. La enromana vorto *muzio* signifas la ĝardenon de la Nacia Muzeo en Budapeŝto.

³ Perforta okupo, transpreno, konfisko de io.

«Nun oni devas scii, kio estas *ejnŝtand*. Ĝi estas speciala vorto de la knaboj. Se pli forta knabo vidas pli malfortan vetludi je kugletoj, plumoj aŭ karobgrajnoj kaj la ludilojn li volas forpreni de ili, li diras: *ejnŝtand*. Tiu ĉi vorto signifas, ke la forta knabo deklaras milittrabaĵo la ludkugletojn kaj kiu kuraĝas kontraŭstari, kontraŭ tiu li uzos perforton. Do *ejnŝtand* signifas ankaŭ militdeklaron. Samtempe ĝi estas la mallonga, sed konciza deklaro de militjuro, pugnoraĵto kaj piratregado.» Fragmento el la romano.

⁴ La kreadon de la filmadaptaĵo de Maurizio Zaccaro (2003) la posteuloj de Molnár volis bojkoti kaj ĝenerale hungaroj ne akceptas, pro troa modifo de la moralaj kaj patriotismaj mesaĝoj de la originala romano.

⁵ Lord of the Flies

⁶ Vasta, enkonstruota ludspaco inter grandaj pluretaĝaj domoj.